# SCIENCA REVUO

volas

(1) subteni la ĝeneralan sciencan nivelon de sia legantaro, pri ĉiaj temoj;

(2) helpi al la fratiĝo de la homoj, libere diskutigante pri la disigaj konceptoj laŭ sciencaj normoj;

(3) science studi la problemojn de la Esperantismo;

(4) evoluigi la lingvon laŭ sciencaj bezonoj, surbaze de la principo de sufiĉo kaj neceso.

Por tiu celo ĝi bezonas ne nur redakcion kaj legantojn, sed ankaŭ verkantojn.

Vidu ankaŭ paĝon 3 de la kovrilo de la unua numero de tiu ĉi jarkolekto.

---

*D-ro W. Manders*

**INTERLINGVISTIKO KAJ ESPERANTOLOGIO**

**ENHAVO**

**Interlingvistika parto**

Ĉapitro I | *La interlingvistiko kaj Esperanto.*
Ĉapitro II | *La naturalismo de Edgar de Wahl kaj Otto Jespersen.*
Ĉapitro III | *La naturalismo de IALA.*

**Esperantologia parto**

Ĉapitro IV | *Taskoj de la esperantologio.*
Ĉapitro V | *La evoluo de Esperanto. Lingva korekteco.*
Ĉapitro VI | *Kompara esperantologio.*

prezo 2.25 Ned. guld. / £ —.5.— / $ —.75

J. MUUSSES — ELDONISTO
Purmerend - Nederlando

Vol. 9-a. N-roj 2-a kaj 3-a (34-a kaj 35-a)
Paĝoj 33-128
1-3-1958
UDK 001(05) = 089.2(100)



SCIENCA REVUO

ELDONO DE J. MUUSSES PURMEREND NEDERLANDO

Sendependa revuo. Aperas kvarfoje jare. Ab.pr. Ned.gld. 5.-, $ 1.50, aŭ egalvaloro.
Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.)

**Redaktoro:** D-ro W. P. Roelofs, Kerkpad zz 75, Soest, Nederlando. **Kunredaktoro kaj Reprezentanto por I.S.A.E.:** G F. Makkink, Eekhoornlaan 10, Bennekom, Nederlando. **Administracia adreso por abonantoj, kiuj ne estas membroj de I.S.A.E.** J. Muusses, Purmerend, Nederlando, Ĝironumero 15062 - **Sekretario de I.S.A.E.:** Prof. D-ro Duŝan Brkiĉ, Vojvode Putnika 118/V, Sarajevo, Jugoslavio.

---

## JUBILEO DE PROF. S. NISHI

La ricevo de la jubilea verkaro dediĉita al prof. Seiho Nishi malkovris al ni ke nia prezidanto atingis la sesan de januaro 1955 la aĝon de 70 jaroj.

Estas iom malfrue por eldiri datoĝustan gratulon al la jubileinto, kvankam la membroj de ISAE volonte farus tion. Tamen ne estas tro malfrue certigi de ĉi tiu loko ke ISAE deziras aliĝi en la jam finsonintaj festaj esprimoj de honorado pro la sciencaj meritoj kaj atingoj de la agnoskita japana anatomiisto. ISAE krome volas aparte eldiri sian grandan ŝaton pro la atingoj de prof. Nishi sur la kampo de Esperanto. Sen lia ekzemplo, inspirado kaj instigado la redaktado de la nomita verkaro kaj la verkado de kelkaj kontribuaĵoj certe ne estus faritaj en Esperanto. Kaj fine, ISAE deziras deklari ke ĝi alte ŝatas la membrecon de prof. Nishi, pli speciale lian pretecon eĉ prezidi ISAE-on. Despli, ĉar al prof. Nishi certe sammezure mankas tempo kiel al ĉiuj konataj universitataj instruituloj.

En la nomo de la membroj de ISAE kaj la legantoj de Scienca Revuo ni esprimas niajn respektajn bondezirojn al la jubileinto.

La vic-prezidanto de ISAE
C. Støp-Bowitz,
La redakcio de Scienca Revuo
W. P. Roelofs,
G. F. Makkink.